

Ipernitanoj  
MALLONGAJ RAKONTOJ

Ipernitanoj  
MALLONGAJ RAKONTOJ

AUTOROJ

Ipernitanoj

MALLONGAJ  
RAKONTOJ

GRUPO DE IPERNITANOJ

## BIBLIOTEKO KURTAJ RAKONTOJ

BÉLA APÁTI KOVÁCS  
LA MALGAJA NEĜULO

**P**eĉjo promenis en la vintra parko. Antaŭ tagoj neĝis kaj hieraŭ la geknaboj faris belan, grandan neĝulon. Sed ili forgesis surmeti ĝin nazon el ruĝa karoto.

Ĝi ploretis amare, kiam Peĉjo alvenis tien.

– Kial vi malĝojas? – demandis li.

– Mi ne havas nazon kaj la birdoj primokas min – Ĝi respondis.

– Mi volonte helpos al vi – diris Peĉjo.

– Kiel vi povus helpi al mi? – ekmiris la neĝulo

– En la proksima strato loĝas mia avinio. Mi petas de ŝi karoton. Certe ŝi donacos ĝin por vi.

Kiam la neĝulo ekvidis sian novan nazon, ĝi iĝis eksterordinare feliĉa. Nun jam ankaŭ ĝi havas nazon, kiel ĉiu neĝulo en la mondo. Ĝi ne devos honti antaŭ la birdoj.

Ĝi dankis la helpon al la knabeto kaj ekde tiu ĉi tago ili ĉiutage renkontiĝis en la parko kaj longe babiladis pri interesaj aferoj ĝis printempo, kiam la neĝulo adiaŭis kaj foriris norden, kie ĉiam estas frosto.

BÉLA APÁTI KOVÁCS  
**FABELETO PRI FIŝETO**

**I**am en fora maro vivis fiŝeto kun sia patrineto tre feliĉe. Dum la tuta tago ili naĝadis inter la blankaj ŝaŭmoj kaj rigardis la flugantajn birdetojn.

– Panjo mia, oh, se iam ankaŭ mi povus flugi! – diris la fiŝeto.

La fiŝopatrino ekridetis kaj diris nenon.

La fiŝeto revante rigardis la birdetojn.

Iutage ĝi ekvidis strangan birdon sur la ĉielo. Ĝi arĝente brilis kaj gracie flugis pli elegante ol la aliaj birdoj.

La fiŝeto nur rigardis la novan birdon.

– Panjo mia, kia birdo ĝi estas? – ĝi demandis.

– Kara mia ĝi ne estas birdo. Ĝi estas aeroplano kaj ĝin konstruis homo. Tiun ĉi aeroplanon direktas la pilotoj.

– Ĉu pilotoj? Oh, se iam ankaŭ mi povus iĝi piloto – revadis la fiŝeto – Mi ĉirkaŭflugus la terglobon kaj mi estus la plej feliĉa fiŝeto en la tuta mondo.

Tiel revadis la fiŝeto ĝis la aeroplano malaperis de sur la ĉielo. Ekde tiu ĉi tago, ĉiunokte ĝi songis pri la aeroplano kaj pilotoj.

## MALNOVA AMO

**L**a maljunulo promenis sur la riverbordo. Li estis sola kaj krom li neniuj estis tie. Jam preskaŭ estis vespero. En la malproksimo vidiĝis la lumoj de la urbo.

Li tre ŝatis promenadi sur la riverbordo. La vidaĵo de la akvo ĉiam trankviligis lin. Ankaŭ nun li sidiĝis sur la riverbordon kaj mute rigardis la akvon.

La akvo malrapide movis portante ankaŭ al li malnovajn memoraĵojn.

Ne ĉiam li promenadis riverborde sola. Iam antaŭ multaj, multaj jaroj al tiaj promenadoj akompanis bela, blonda knabino kaj ili kune revadis rigardante la stelojn sur la ĉielo.

Sed ve, tiu tempo jam delonge forpasis. La rivero forportis ankaŭ la malnovan amon. Li restis sola. Tiu bela, blonda knabino malaperis por ĉiam el lia vivo. Tamen bone pensi pri ŝi kaj denove travivi tiujn karajn momentojn.

Li fermis la okulojn kaj pensis, ke ŝi estas kun li. La maljunulo volis ekpreni ŝian molan manon, sed li prenadis nur aron da herboj.

Eta larmoguto ekaperis en liaj okuloj kaj ekiris hejmen lasante memoraĵojn riverborde.



DIMITRIJE JANIČIĆ

## PUNKTO

**M**i malamas punkton! Eĉ ĝin sur la fino de la frazo. Mi ne konfesas ĝin.

Ĝi volas fermi al mi pardonon, volas detrui min, forrabi al mi amon. Ĝi volas fini mian tagon.

Ĝi deziras ĉesigi miajn opiniojn. Ĝi volas ŝlosi min.

Sube punkto!

Elĵetu tiun balaaĵon el ortografio!

## PASAS LA NASKO

**P**asas la tempo, sed vi ne pasas, vi firme sidas en miaj cerbo kaj koro, vi estas la eterne dolĉa, kara kaj malhavebla, transmonda doloro.

Min portas plu la vojo, mi esperas havi vin foje, ĝis alvenos aŭtuno, vintro, kaj defalos la folioj angore. Min elŝvitis la frumateneno, kaj min absorbos la vespero, same, kiel ĉiujn. Donu al mi ideton! Kiu plukantus la nekantitajn, kies buŝo malfermiĝos, kiam la mia fermiĝos. Estu li eterne laŭdata, vesperoj se mornas, matenoj se spronas nin vivi plu, kvankam min perdis jam, elfaligis el siaj polmoj la Eternulo. Vivakre mi sonas, kiam en sia forto malflamiĝos ĉi am', ke ne plu, ke ne plu – kaj ĉiam re- kaj rekomencu, ĉar baras nin ĉirkaŭe la nokto. Mi amas vin. Kiom simple! La suno venas supren. Kiel krio ĝi venas tra la ĉifono de nebuloj, kaj abrupte ĝi trovis sin sur la kruco de la mondotuto. Kaj ekhumilas nun, mi puŝas mian kapon sub la polvon, mi etendiĝus kun la ebena grundo, kaj mi ŝirmus eĉ miajn her-

bojn, kiuj abrupte ekkreskas neatendite. Ho, kara mia, foras la ĉielo, kiel la koro, kaj foras ĝiaj tigoj, la tagoj, branĉoj malsupren kliniĝantaj. Helpu min supren! Mi ne scias, kiel, mi ne scias, kial! Ne helpu min por kriegi, mi ne krias por helpi. Milde paŝante ĉu ekzistas vojo por mi? Ĉu mi ribelu frenezule, daŭre montrante al via koro, ke mi volas la plej belan pomon? La pomoj putriĝas, vane ili ruĝis, ruĝa putro ilin atingas. Mi amas vin, sed mi ne scias diri, kiel. Kiel venas eŝafodo lante ŝvebante pli kaj pli supren ĝis la nivelo de leĝo, por ke murdo estu sanktigita, preskaŭ dia! Kvankam dio ĉiam nur kreas, se ne estas io cetera, almenaŭ doloron vivantan kaj amon, kiel la naskon.

TEREZA KAPISTA

## MIA AVO

**L**a jaro 1914, komenco de la Unua mondmilito. Miaj geavoj havis belan familian vivon en Szabadka sur propra bieno. Ĝoje kaj kontente pasigis la jarojn kun 6 kaj 4 jaraj filinoj. Sed, ho, ve, mia avo Ferenc estis rekrutita por soldatservo en Aŭstro-Hungarujo.

Tuj estis sendita al batalkapno en Rusio. La avino restis sola kun du infanoj. Post tri jaroj de milito mia avino Tereza ricevis oficialan leteron: „Estimata, sinjorino, ni informas vin ke via edzo Nadj Ferenc heroe falis sur la batalkampo en Rusujo, defendante sian patrujon. Ricevu nian kondolecojn.“ Letero mallonga kaj senesperiga. La funebra jaro pasis, lukto por la vivo restis. Mia avino havis nur 30 jarojn. Kion fari? Troviĝis bonkora viro kiu estis preta edziniĝi la vidvinon kaj akcepti la du infanojn, Li eĉ adoptis ilin kaj donis la propran familion nomon al ili. Kune ili daŭrigis la vivon trankvile. Sed la militaj kaj postmilitaj jaroj alportis multajn infektajn malsanojn kaj je tifo mortis la pli juna filino.

La jaroj pasadis sen novaj streĉoj. Subite kaj tute neatendite en la jaro 1924 reaperis mia avo Ferenc. Iris al hejmo kaj frapis sur la pordon de sia hejmo. La pordon malfermis nekonata viro. Ĉiuj estis ŝokitaj kaj ne kredis je propraj okuloj. Jes, Ferenc revenis viva el siberia militkaptejo. Pri tiuj jaroj li ne deziris rakonti! Li estis akceptata kaj la konsultiĝo komenciĝis. Ili demandis pri opinion la pastron kiu geedzigis ilin. La pastro estis konfuzita dirinte ke la avino neniel povas havi du edzojn. Laŭ li nur Tereza povas decidi kiun de ili du akceptos.

Ŝi cerbumis kaj fine diris ke ŝi jam forgesis post 10 jaroj kia estis la unua edzo kaj restos kun la nuna edzo. Mia avo tion senriproĉe akceptis. La vivo estas kruela!

En la jaro 1933 subite mortis mia avino Tereza. Ambaŭ edzoj postiris la ĉerkon kaj akompanis ŝin al la lasta vojo. Poste la du vidvoj ofte renkontiĝis en ĉeangula eta trinkejo elvokante la rememorojn pri Tereza: ŝia boneco, beleco kaj ĉiam ridetanta mieno. Ili nomis unu la alian "ŝogor" (en hungara) tio signifas bofrato. Kiam ili eniris la trinkejon ĉiuj diris „jen venis la bofratoj!“ Unue mortis la dua edzo poste en 1941 la unua Ferenc. Kruela milito kaj kia vivo?

SADY METZDORFF

## ĈIELA RETPOŜTO (AŬ INFERA?)

**I**u vidvino, kiu antaŭnelonge perdis ŝian karan edzon aŭtomobilakcidente estis kompreneble, malfeliĉa.

Distriĝi serĉe ŝi sidiĝas antaŭ komputilo kaj legas la novajn retpoŝtojn kaj... kia granda surprizo! Ŝi ne sciante pri la afero, ke alia persono emejladreson eraris kaj pro tio ia emejlo ĝuste venis al ŝia retadreso. La vidvino legis la retpoŝtomesaĝon kaj tuj post ŝi svenos ĉe komputilo.

Ĉe ŝi loĝas nur sia filo kiu kuradis al komputilĉambro pro aŭdo de io stranga. Do, li legas ankaŭ terurigiton, kio estas en la ekrano skribita:

„Kara edzino mi faris bonan kaj agrablan vojaĝon. Mi jam alkutimiĝis je nova domo, ĉar ĉi tie estas tre komforta. Eĉ komputilon mi havas kaj estas ankaŭ permesata e-mejlo kaj retnavigado. Mi estas

reale feliĉa ĉar mi havos la certecon je via  
alveno ĉe mi en la proksima semajno!

Ah, kara edzino ne alportos multe da  
vestaĵojn. Ĉi tie, estas infere varma! Ĝis  
baldaŭ mia kara! Multe da kisoj mia amata!“

DIMITRIJE JANIČIĆ

## KULPULO

*Domo. Edzo kaj edzino.*

**Ŝi:** – Mi scias! Vi estas kulpa. Vi forgesis...

**Li:** – Sed, kara...

**Ŝi:** – Ne, ne! Mi scias. Vi...

**Li:** – Tamen, karulino! Mi tiam estis en alia lando, oficiala vojaĝo... Ĉu vi memoras, mi vojaĝis tra Pollando dek tagojn...

*Malgranda paŭzo.*

**Ŝi:** – Pro kio mi edziniĝis sed ke anstataŭ mi iu estu kulpa?!

**Li:** – Mi komprenas, karulino, mi komprenas! Ĉio estas klara.

*(Fino)*



ROLAND PLATTEAU

## LA PILOLO DE MALAMO

„Maĉu al la libero !“

Jen tutnova varo, kiu solvontas viajn problemojn: speciala maĉgumo emigas vin malami. Kun aŭspicio de la Ministrejo pri Publika SANO, kadre de la „Batalo kontraŭ la Dependencoj“ kompreneble.

Dependenco je amata estaĵo, ankaŭ tio estas dependenco, kaj oni el tio elmamigu. Dank'al tiu gumo, entenanta specialan substancon, tagon post tago vi estos liberiĝantaj el via dependenco je ĉia amata estaĵo, kaj vi estos, fine! psike liberaj, kaj korektaj.

Finfine vi ne plu kapablos ami iun ajn, eĉ ne vin mem (alia dependenco), tiel vi povos marĉi al la eŭtananzio kun plena sereno!

PETER BOWING

## VANGOFRAPO

**S**esdekjara gimnaziano alrigardas la grizan vintran komparon tra la trajnfenestro. Lia samklasanoj loĝas en la urbo, do li vojaĝas sole. Li devas ĉiutage venturas per trajne al sia vilaĝo. Estis nur unu halto per rapida trajno.

Kutime malplena estas la sesloka kupeo. Sed hodiaŭ kontraŭ li sidas ĉirkaŭ dudek kvinjara virino. Ŝi estas bela, kaj li volas, ke li ne regardegu al ŝi, ĉar li sentas sin embarasita. Li povas vidi, ke ŝia hararo estas kurta kaj nigra. Ŝi portas nigran komercan kostumon kaj legas ian protokolon. Li sentas ŝian parfumo.

Post kvin minutoj la trajno alvenos ĉe la malgrada stacidomo, kie li eliros.

Ŝi metas siajn paperojn en sian mansakon. Ekstaras ŝi. Super lia kopo estas pakajbreko. Antaŭ li streĉas ŝi; ŝia svelta korpo dumsekunde frotas lian vizaĝon. Li enspiras ŝian odoron. Ŝi prenas sian sakon de la breko kaj ordigas ĝin apud sian mansako.

Ŝiaj okouloj neniam antaŭe renkontis la liajn. Sed nun ŝi regardas lin kaj ridetas. Senvole li regardegas ŝia belan inan korpon. Rapide kaj forte per sia dekstra mano ŝi vangofrapas lin. Pro subite surprizo li ĝemas; li forte spiras. Li sentas la doloron en sia vizaĝo kune kun la plezuron en sia korpo. Li ne povas paroli kaj ŝi ne parolas.

Malapidiĝas la trajno. De ŝia poŝo ŝi prenas mentan dolĉaĵon, enbuŝas ĝin, tiam tuj ĝin elkraĉas enmanen. Li nur silente regardas ŝin senmove. Antaŭ lia vizaĝo ŝi malfermas la manon. Sen pensante li ensuĉas de ŝia manplaton la dolĉaĵon.

Haltas la trajno. Rapide li enmanteliĝas, prenas sian lernosakon kaj senvorte eliras la kupeo.

## SILIKOJ

**M**i konstante plutenas en miajn vestopoŝoj iuj el tiuj silikoj, kiujn mi kolektis desur la padoj de *l'Ternois*, kiam mi promenis ene kun *Jacqueline*, kaj kies makuloj blankaj sur nigra fono tiom trafe similis vidojn de galaksioj (kaj interstelaj nuboj) en profundprofunda ĉielo.

Mi ofte levis silikojn de sur la padoj, kaj estinte plurfoje fascinita per tio, mi selektis la plej belajn, kaj ilin konservis enpoŝe por ilin kontempli kiam plaĉos al mi. Kaj mi pensis, plian fojon, al ĉiuj tiuj miliardoj da steloj, obligitaj per tiuj miloj da galaksioj, tamen reduktitaj je etetaj longaformaj makuletoj en teleskopoj, kiujn nome konsistas el abismoj da miliardaj jaroj, miliardoj da ŝancoj ke estiĝu biologiaj vivoj, pensantaj estaĵoj, civilizoj, personaj destinoj, ĉiuj unikaj, ĉiu tragikaj, ĉiuj pasiindaj, kaj pasiitaj, kiuj demandas sin, eble, ĉimomente la egalajn demandojn, nu, vidu, ktp, ktp. Kaj la kosmeca sento pri riĉeco senlima, sed ankaŭ kunekun, pri vanteco,

tuta vantecego, kaj tragikeco de ĉio, de ĉiuj,  
en „La eterna silento de la spacoj – kaj de  
eterna nenieco – senlimaj“.

Kiuflanke estas la elvorto pri la afero ?

Tiuj silikoj en miaj poŝoj jen estas ĉio,  
kio restas pri mi, pri ni, el tiuj promenadoj  
forpasemaj, kaj deĉiam mortkondamnitaj,  
kiel ĉio, kiuj estis hejmecaj, ĉiutagaĵaj, kaj  
nunantaj...

ZHANG XUESONG

## INVERSIGO DE HOMO KAJ DIABLO

*(malnova ĉina rakonto)*

**I**am vivis homo, li havis du filojn. Iutage kiam la filoj prilaboris kampon, venis subite ilia patro, li ilin batis kaj insultis sen ia ajn kialo. Tio vidiĝis de knabo en la vilaĝo, li kuris al ilian hejmon kaj rakontis la okazaĵon al ilia patrino. La patrino demandis al la patro por tio. La patro surpriziĝis kaj supozis, ke tio estis faro de diablo. Li do ŝtele diris al siaj filoj: “Se revenus la diablo, mortigu lin.” De tiam ne plu aperis la diablo.

Post kelkaj tagoj, la patro maltrankviliĝis kaj timis ke la filoj ensorĉiĝis de la diablo, li decidis iri al la kampo por ilin rigardi. Kiam vidis la patron, la filoj opiniis ke li estis la diablo. Malgraŭ ĉio ili kune mortigis kaj enterigis la patron.

En tiu ĉi momento la diablo transformiĝis en ilian patron, li iris en ilian hej-

mon kaj diris al la patrino, ke la filoj jam mortigis la diablon.

Vespere la filoj revenis de la kampo kaj la tuta familio kune celebris por la mortigo de la diablo.

Multaj jaroj pasis, la familianoj nenion sciis pri la vero.

DOROTY BURCHARDT

## NAJLA SUPO

**E**n vilaĝon venis cigano. Li iris al la domo rande de la vilaĝo kaj petis ion manĝi. La mastrino diris, ke ili mem estas malriĉaj, havas nenion por manĝi. La cigano proponis: mi eĉ kun najlo scipovas kuiru supon.

– Nekredeblee! – miriĝis la mastrino.

– Mi povas demonstri tion al vi, se vi deziras.

Scivolo de la mastrino estis granda, do ŝi konsentis, ke la cigano kuiru la supon. La cigano petis kuirpoton kaj akvon kaj najlon. Ĉion ĉi la mastrino donis al li kaj pacience atendis, kio okazos. La cigano boligis la akvon kun metita en ĝi najlo kaj diras al la mastrino: donu plenmanon da grio. La mastrino tuj plenumis lian peton kaj la cigano ĵetis la grion en la poton. Poste li petis iom da pizo; tiun li ankaŭ metis en la poton. Poste li denove petis jen kelkajn ter-



pomojn, jen iom da lardo, salon kaj kremon kaj la mastrino fervore liveris la petitajn produktojn. Fine la supo estis preta; ĝi estis bongustega kaj la mastrino ege miris, ke oni povas kuiri tiom bongustan pladon nur kun najlo ... kaj laŭdis kaj dankis al la cigano.

HELENA BURCHARDT

## MUSOJ KAJ MI

**M**i kredas, ke ĉiuj scias kiel aspektas muso – malgranda griza besteto, kiun kutime homoj ne ŝatas, aparte la virinoj; ili vidinte muson saltas sur tablon laŭte petante helpon. Certe mi estas escepto nur konfirmanta la regulon aŭ ... mi ne estas centprocenta virino; mi ne timas muson. Mi kompatas ilian malfacilan sorton. Homoj volas ekstermi ilin, kiel damaĝuloj aŭ uzas ilin dum sciencaj esploroj, malliberigante kaj plej ofte suferigante ilin.

Kiel infano mi loĝis en vilaĝo kaj en vilaĝaj bienoj multis musojn kaj multis katojn, kies tasko estis ekstermi povrajn musojn. Ne alie estis en mia familia domo kaj bieno. Mi memoras multajn katojn, sed precipe unu katinon, kiu estis tre ĉasema, kaj kiu havis kutimon alporti ĉasitan muson kaj meti ĝin ĉe miaj piedoj aŭ ĉe la piedoj de mia patrino. Mi tre ŝatis katojn kaj eble tio estis ia formo de rekompenco?

Ĉiufoje, kiam la katino alportis muson mi laŭdis ĝin, sed doloris min koro, precipe se la povra muso ankoraŭ vivis kaj la katino tenis ĝin per ungoj aŭ donis ĝin al siajn

idojn por ke tiuj spertiĝu pri ĉasado. Nia familia domo estas negranda teretaĝa domo, mi dormis en malgranda ĉambro kaj somere plej ofte mi dormis ĉe malfermita fenestro.

Iun nokton vekis min miaŭado de la katino, ĝi venis sur mian liton kaj estis klare, ke ĝi intence min vekas. Mi vekigis, mi mankareisis la katinon, sed ĝi ne ĉesis miaŭadi; mi iom koleriĝis kaj ĉirkaŭrigarde kaj palpe esploris la liton. Evidentiĝis, ke la katino kaptis muson, alportis ĝin sur mian liton kaj vekis min, ke mi tion ne preteratentu. Unue mi tre koleriĝis, sed tuj poste venis la penso en mian kapon: nu kial koleriĝi, la katino alportis al mi matenmanĝon kaj mi admonas ĝin kaj riproĉas anstataŭ danki ... De tiu nokto mi lasis malfermitan nur magrandan fenestreton supre, tra kiu la katino ne povis eniri, ĝi estis tro alte lokita. Tio estis la unua tre proksima renkontiĝo kun muso.

La tempo fluis, mi plenkreskis kaj ekloĝis en alia urbeto, verdire en vilaĝo, kie mi komencis labori. Tie mi renkontis belan plenkreskan katon, kiu sidis sur ŝtona fositeto kaj miaŭis kvazaŭ petante ... ĝuste kion? Mi alparolis ĝin, ĝi probable komprenis tion kiel inviton kaj postsekvis min, kaj kompreneble ekloĝis kun mi. Denove mi loĝis teretaĝe kaj tio estis tre oportuna fakto por la kato. Ĉiam estis malfermita fen-

estreto tra kiu ĝi povis eniri kaj eliri laŭplaĉe. Ĝi nokte ĉiam vagadis ien, ĉasis kaj revenadis nur matene, sed tre akurate; je la sepa matene ĝi revenadis kaj lokiĝis sur seĝo ĉe tablo, atendante matenmanĝon. Okazadis, ke ankaŭ dum tage ĝi foriradis aranĝi iujn kataferojn. Ĝuste tiam okazis mia dua proksima renkontiĝo kun muso. Estis posttagmezo. Post la reveno el laborejo mi enŝaltis elektran varmigilon, ĉar estis malvarmete, mi supozas, kaj mi komencis legi libron. La kato estis ie ekstere. Atentigis min iu susuro, mi ĉirkaŭrigardis kaj kion mi vidas? Apud la elektra varmigilo sidas muso kaj tute trankvile varmigas sin. Mi proksimiĝis al ĝi, sed ĝi ne forkuris. Do mi proksimiĝis ankoraŭ pli kaj de proksime mi rigardis ĝin; ĝi aspektis tute kontenta kaj mi kuraĝis karesi ĝin per unu fingro. La muso ne forkuris ... Kaj tiam mi febre komencis pensi kiamaniere savi la muson, ja certe post nelonge venos mia kato. Kompreneble mi elpensis nenion racian kaj tiutempe tra fenestro venis la kato, ĝi tuj rimarkis la muson, dum palpebrumo kaptis povrulinon kaj tenante ĝin en dentoj cerbumis dum momento, strabante miadirekten; probable ĝi ne opiniis min fidinda, ĉar kune kun la muso ĝi malaperis malantaŭ la fenestro. Tiu kato neniam alportis al mi iun ajn ĉasaĵon. Kaj ĝi ĉasis multe, mi ofte vidis birdplumojn sur la fen-

estra parapeto.

Pasis kelkaj jaroj; denove mi ŝanĝis loĝlokon. Nun mi loĝis kun la edzo kaj filineto kaj kompreneble kun kato. Mi loĝis en dombloko, en la unua etaĝo kaj mi ne scias kiamaniere venis tien musoj. Tiu aventuro kun musoj estis mallonga kaj malgaja. Iamaniere du musojn troviĝis en banĉambro kaj mi trovis ilin en sitelo da akvo, ili simple dronis, probable serĉante akvon. Ĉar tiutempe ofte mankis akvo en kranoj, do ĉiam staris en banĉambro sitelo da akvo. La kato eĉ ne vidis ilin; banĉambro estis fermita.. Mi supozas, ke aŭtune kampaj musoj serĉis lokon por vintro, grimpis tra muro de la domo kaj profitante la malfermitan balkonan pordon eniris internen.

Probable sammaniere eniris denove unu muso en mian hejmon. Mi vidis spurojn de ĝia estado kaj probable la kato ankaŭ ion sentis. Iun tagon, mi malfermis ŝrankon en kiu staris ujo por forĵetaĵoj, mi volis ion meti en ĝin kaj subite mi nur ekvidis la katon, kiu fulmrapide venis kaj kaptis ion, mi ekaŭdis pepon kaj mi ekvidis mian katon kun muso en dentojn. Probable la muso ek-saltis el tiu ujo kaj la kato tuj reagis. Ni ĉiuj estis surprizitaj inkluzive kun la kato. Ĉasinstinkto sufloris al ĝi kapti, sed ĝi ne sciis kion fari kun tiu predo. Ja ĝi loĝis nur en loĝejo. Ĝi iris en tagĉambrom kaj meze de la ejo lasis la povran muson, kiu estis

viva, sed ege terurigita. Mi, la edzo kaj la kato staris kaj gapis, kaj la muso per tremetantaj piedetoj kuris en la direkton de kanapo kaj antaŭ ol ni ion ajn decidis, ĝi rampis suben. Nun la kato komencis lamenti, postulante, ke ni redonu al ĝi la predon. Post ioma cerbumado ni decidis, ke ni tamen devas iamaniere forigi la muson de sub la kanapo, ĉar ja ni ne sciis, kiom multe damaĝis ĝin la kato, ĉu ĝi ne mortos tie. Do ni iom deŝovis la kanapon de vando, mi tenis katon de unu flanko de la kanapo, kaj la edzo batetis la kanapon per iu balailo de alia flanko, por ke la muso forkuru de sub ĝi. Ni sukcesis atingi celon kaj kiam la povra muso aperis de sub la meblo mi lasis katon kapti ĝin kaj tiufoje mi metis la katon kune kun la kaptita muso sur balkonon kaj fermis la pordon. Nun la kato rapide mortigis la muson kaj lasis ĝin sur la balkono. Dum kelkaj tagoj persekutis min penso pri tiu povra besteto, tremetanta pro timo ...

Antaŭ kelkaj jaroj, junio, mi feriiis en montaro Bieszczady, tre bela montoĉeno. Montarajn deklivojn ĝis la alteco 800-1000m kovras arbaro. Kaj ĝuste tiun jaron mi vidis multajn musojn sur arbaraj padoj. Ofte mi haltis por observi ilian kuradon tien kaj reen; jen muso kaŝiĝis en iu tertrueto kaj kiam mi staris aŭ sidis surtere silente, ĝi post iom da tempo aperadis kaj daŭrigis sian laboron. Ĝenerale

ili estis malmulte timemaj, tamen la kuraĝo de unu el ili estis mirinda. Mi staris sur herbkovrita pado kaj observis kelkajn svarmantajn musojn, kiujn tute ne ĝenis mia persono. Kaj unu el ili venis esplori mian sportŝuon. Ĝi atente ĉirkaŭiris ĝin kaj poste komencis grimpi supren. Tion mi ne povis permesi; poste mi cerbumis - ĉu la muso estis tre juna kaj sensperta, ĉu tre kuraĝa? Ĝi ne aspektis malsana, ĝi estis tro vigla kaj ŝajnis esti scivola pri la mondo. Tiufoje mi estis kontenta, la muson mi lasis vivan kaj feliĉan, almenaŭ portempe, ĝis kiam iu alia besto aŭ birdo ne kaptis ĝin. Eble ĝi estis bonŝanca kaj ĝisvivis maljunecon, fariĝante patrino, avino, eble eĉ praavino?

Mia lasta aventuro kun muso okazis antaŭ du aŭ tri jaroj, somere. Tiutempe mi havis hejme tri katinojn. Tiu estis blanka muso. Iun tagon matene, kiam mi lavis vazaron en la kuirejo, mi rimarkis blankan muson trakuranta ŝrankon. Nu blankaj musoj ofte homoj bredas en domoj, sed ankaŭ oni diras, ke kiam drinkulo ne povas ĝustatempe saturigi sin per alkoholo, li deliras kaj vidas blankajn musojn. Mi ne bredis blankajn musojn, mi ne estis drinkulo, nek mi drinkis ion ajn matene aŭ pasintan vesperon. Do, mi konstatis, ke tiu muso vere ekzistas. Mi rememoris, ke la knaboj de mia najbaro el la tria etaĝo havas blankajn musojn, ĉar mi vidis, ke eĉ unu el la musoj ili

„promenigis“ sur korto; ĝi promenis sur la ŝultro de la knabo. Kaj certe dum tiu promenado la muso falis kaj forkuris. Kaj poste grimpis al mia loĝejo. Mi ofte havas malfermitan balkonan pordon, do ĝi venis senprobleme en mian hejmon. Mi demandis la infanojn, ĉu ili perdis muson - jes, ili diris, ke ĝi „iel perdiĝis“. Mi diris, ke la muso estas en mia domo, nur estas problemo, ĉar mi posedas tri katojn ... Ili petis min redoni la muson, sed kiamaniere mi kaptu ĝin? Ĉu la katoj ne kaptos ĝin pli frue? La muso kuris tien kaj reen ie malantaŭ la ŝranko kaj mi cerbumis kiamaniere ĝin savi. Mi elpensis – miaopinie tre saĝan solvon – sur la kuirejan ŝrankon mi metis vitran ujon kun peco da fromaĝo interne kaj mi kuŝigis la ujon, esperante, ke la muso eniros en ĝin, serĉante manĝon. Sed mi devis foriri el la domo. Mi klopodis rapide reveni kaj esperis trovi la muson interne de la ujo. Bedaŭrinde mia atendo estis vana. La fromaĝpeco kuŝis ne tuŝita kaj muso estis Dio scias kie. Iumomente mi rimarkis, ke unu el la katinoj kun intereso enrigardas malantaŭ ŝrankon, kiu staras en antaŭĉambro (ŝranko por ŝuoj). Mi ankaŭ enrigardis tien kaj mi rimarkis la povran muson. Ĝi sidis tenante per antaŭaj piedetoj telefonkablون kaj ne ŝajnis ema forkuri. Mi iom deŝovis la ŝrankon, supozante ke venis la lasta momento por la muso, ĉar intertempe ĉiuj katinoj venis vidi



kio okazas. Kaj okazis miraklo! La muso iomete moviĝis, sed ne forkuris, forkuris la katinoj! Do mi profitis momenton, kaptis muson kaj enmetis en vitran ujon. Tie plu estis fromaĝpeco, kiun ĝi kun apetito komencis manĝi, kaj formanĝinte ĝin, dolĉe ekdormetis. Kortuŝis min ĝia fido – ĝi sidis en la ujo sur malantaŭaj piedetoj, per la antaŭaj ĝi lavis sin kaj poste kruciĝinte ilin sur ventro ekdormis sidante.

Mi informis la knabojn, ke la muso estas viva kaj ili povas ĝin forpreni. La katinoj ne estis intertesitaj pri ĝi ... Kaj mi estis tre, tre kontenta.

## MIA AVO MITAR

**M**ia avo Mitar vivis en iu malgranda vilaĝo en Hercegovino. Komence de la dudeka jarcento, en tiu vilaĝo estis nek vojoj nek kuracistoj. Malriĉeco kaj malsanoj premis la tiamajn vilaĝanojn. Tiam okazis ankaŭ epidemio. Verŝajne pestepidemio, mi ne scias pli precize.

Mia avo havis, interalie, filinojn ĝemelinojn. Iu pereis dum ŝi paŝtadis la brutaron. Oni diris al mi ke ŝi falis de sur granda ŝtonego. Kompreneble, ŝi mortis, ĉar ne estis kuracisto por helpi. La sekvintan tagon mortis ŝia fratino ĝemelino. Pro malĝojo.

Tiu okazo timigis la najbarojn, parencojn kaj amikojn de mia avo. Neniu alvenis por kondolenci aŭ por helpi al mia avo. Ĉiuj estis kovinkitaj ke la junuloj mortis pro la pesto. Kion fari, pensadis la avo kaj decidis...

Li prenis guzlon, eliris antaŭ la domon, eksidis sur ŝtonan benkon kaj ekguzlis.

Kvankam li malĝoje guzlis, li ŝokis ĉiujn: najbarojn, parencojn kaj amikojn. Tamen ĉiuj rapide ekkomprenis ke avo Mitar kuraĝigis ilin tiamaniere kaj invokis ilin por helpi. Multaj estis hontintaj kaj ĉiuj alvenis al la avo.

Por kondolenci kaj helpi lin.

